- **UEA** = Universala Esperanto Asocio : association mondiale pour l'espéranto
- **Pasporta Servo** : guide d'adresses pour être hébergé gratuitement dans le monde entier lors de voyages à l'étranger, édité par TEJO.
- **Jarlibro** : guide mondial de tous les délégués d'associations ou clubs locaux d'espérantophones, édité par UEA.
- Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans, mais ne disposent pas du droit de vote à l'assemblée générale.
- Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.
- L'adhésion est valable pour 4 trimestres, à compter de la date d'adhésion. Vous recevrez les numéros de *JeunEsperanto Info* et *Konkize* à paraître après votre date d'adhésion.
- Si vous souhaitez que vos coordonnées restent confidentielles, cochez la case suivante :

Chèque postal, bancaire ou mandat lettre à l'ordre de "Espéranto Jeunes" à joindre à ce bulletin d'adhésion à : **J.E.F.O. 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS**

CIRCULAIRE du 8 juin 1923

à MM. les Recteurs, relative à l'interdiction de l'enseignement de l'Espéranto dans les établissements d'enseignement public.

Depuis quelque temps on me signale qu'une propagande des plus actives est faite, tant auprès des élèves des établissements d'enseignement qu'auprès des maîtres, en faveur de l'Espéranto. J'ai même été saisi, à plusieurs reprises, de demandes émanant de corps constitués ou d'associations, tendant à faire figurer l'Espéranto au nombre des matières qui sont enseignées dans les établissements de l'enseignement primaire, de l'enseignement secondaire et de l'enseignement technique. C'est pourquoi j'estime que le moment est venu de l'examiner la question de l'Espéranto dans ses rapports avec l'enseignement public.

Je suis absolument convaincu que l'Espéranto n'a aucun titre à figurer dans l'enseignement. Les raisons qui ont fait introduire de plus en plus les diverses langues vivantes dans les programmes, n'existent pas pour l'Espéranto. Pour admettre l'enseignement d'une langue dans nos classes, il faut qu'elle ait à la fois un usage très répandu et une littérature digne de ce nom. L'Espéranto n'a ni l'un ni l'autre.

Je n'insiste pas ici sur le caractère artificiel de l'Espéranto. Quels que soient les avantages pratiques pour les relations commerciales que peut avoir un instrument qui, en ce cas, n'a la valeur que d'un code télégraphique, il est absolument chimérique de penser qu'un jour prochain la plupart des hommes arriveront malgré leurs mentalités si diverses et leurs aptitudes linguistiques si différentes, à prononcer les mêmes sons de la même façon et à donner les mêmes sens aux mêmes mots.

Je crois aujourd'hui devoir appeler votre attention sur les dangers que l'enseignement de l'Espéranto me paraît présenter dans les circonstances que nous traversons. Il serait fâcheux que l'éducation à base de culture latine que nous défendons puisse être amoindrie par le développement d'une langue artificielle qui séduit par sa facilité. Le français sera toujours la langue de la civilisation et, en même temps, le meilleur moyen de divulguer une littérature incomparable et de servir à l'expansion de la pensée française. J'ajoute, au point de vue strictement universitaire, que le développement de l'Espéranto nuit à l'enseignement des langues vivantes encore trop peu répandues et trop peu efficaces.

Aussi bien, les dangers de l'Espéranto semblent s'être accrus depuis ces derniers temps. Des organisations internationales, qui ont leur siège à l'étranger, s'efforcent de développer les relations entre les groupes espérantistes des divers pays. D'après les documents que publient certains de ces organismes, le but de cette propagande ne serait pas tant de simplifier les relations linguistiques entre les peuples, que de supprimer, dans la formation de la pensée, chez l'enfant et chez l'homme, la raison d'être d'une culture nationale.

Ces groupements visent surtout l'esprit latin et, en particulier, le génie français. Suivant l'expression même d'un espérantiste, il s'agit de créer la séparation de la langue et de la patrie. L'Espéranto devient donc l'instrument d'action d'un internationalisme systématique, ennemi des langues nationales et de toutes les pensées originales qui expriment leur développement.

Ces données aident à comprendre l'intérêt que certains groupements suspects attachent à l'Espéranto et l'intensité de la propagande que leurs adeptes, conscients ou non, déploient en faveur de son enseignement officiel et obligatoire. Il n'y a pas lieu, naturellement, de mettre en doute la bonne foi de nombreux Français, souvent éminents, qui n'ont jamais vu en l'Espéranto qu'un instrument pratique de correspondance.

Pour ces diverses raisons, je vous prie d'attirer l'attention des parents et des élèves des établissements qui sont placés sous votre autorité sur la propagande espérantiste. Vous vous attacherez à leur démontrer, en revanche, l'importance et le caractère indispensable de l'étude des langues vivantes pour la formation des jeunes Français. Je vous prie également d'avertir les professeurs et les maîtres d'avoir à s'abstenir de toute propagande espérantiste auprès de leurs élèves. Vous inviterez les chefs d'établissement à refuser, d'une manière absolue, le prêt des locaux de leurs établissements à des associations ou des organisations qui s'en serviraient pour organiser des cours ou des conférences se rapportant à l'Espéranto.

Je vous prie de m'accuser réception de la présente circulaire.

LÉON BÉRARD.

À suivre ...

9 Bosniaj infanoj en Suda Francio

Dino ! Tarik ! Miran ! Kion vi preferas, iri al St-Girons por butikumi aŭ amuziĝi en la naĝejo ?

La knaboj, kiuj ne havis okazon butikumi antaŭe, preferas butikumi, dum Merina, Denisa, kaj Anida preferas resti kun Mathilde, Amandine kaj Aurélie, iliaj francaj amikinoj en la restadejo La Maraude.

Hodiaŭ 18-a de julio 1998 estas por naŭ bosniaj junuloj la lasta tago de tri-semajna restado en nia tuluza regiono.

Por ili, la aventuro komenciĝis jam en septembro 1997, aŭ januaro 1998, aŭ eĉ en marto 98 por tiuj, kiuj nur tiam komencis lerni esperanton.

Senad Ĉolic, la prezidanto de Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino, estas delonge en koresponda rilato kun Esperanto-Kultur-Centro (EKC) de Tuluzo. En julio 1997 EKC informas lin ke la projekto inviti dek lernejanajn de Sarajevo al Tuluza regiono realiĝos

venontan someron. Tiu saman jaron, esperanto-kursoj ekfunkcias en kvar diversaj lernejoj de Sarajevo, kaj ankaŭ en Zenica, je 30 km de Sarajevo.

Senad, post pripenso kaj interkonsiliĝo, elektas infanojn el diversaj lokoj por la vojaĝo la Tuluzo, komencantojn same kiel fluparolantojn : ja gravas ke eĥoj de tiu aventuro plejvaste dissemu informojn pri esperanto.

Merima kaj Denisa, kiuj lernas esperanton de pli ol du jaroj, jam flue parolas, sed Dino kaj Miran apenaŭ balbutas. Tamen tiu ĉi vojaĝo espereble donos al ĉiuj vojaĝemon, kaj do stimulos al lingvolernado.

Kaj ĉe la francaj korespondantoj, kiel do okazis ?

Aurélie, Mathieu, Yves, Mathilde... kaj aliaj interesiĝis pri anonco de sia matematika instruistino : "Se vi deziras korespondi kun infanoj de Sarajevo, kaj eble renkonti ilin,

venu al la kunveno la ...". La proponita esperanto-klubo kun tiu ambicia celo, allogis pli ol dudek lernejanajn, sed nur dekkvin restis, kiuj regule kunvenis kaj lernis la lingvon ĉiusemajne dum la tagmanĝa paŭzo.

La gepatroj poste estis invititaj al la kunvenoj, kie venis sep aŭ ok familioj, kiuj preskaŭ ĉiuj konsentis gastigi bosnian infanon.

Entuziasmo regis en la esperanto-klubo, eĉ inter tiuj, kies familioj ne povas gastigi. Oni sendis leterojn, kartojn kun desegnoj kaj kasedoj, oni preparis skeĉojn en esperanto, kaj oni kontribuis diversmaniere al monkoklektado, per vendo de kartoĵoj, kukoj, ktp...

Fine, la 30an de junio, ILI ALVENIS, per buseto, ĉiuj klubanoj atendis ilin antaŭ la preĝejo de Castanet, kie estis la rendevuo. Emocia momento, kiam la bosniaj infanoj, vojaĝinte pli ol tridek horojn, devis disĝi por iri en siajn gastfamiliojn.

Dino, la plej juna, tute ne



Foto : Castanet : en la ĝardeno de Caroline, lernejanaj francaj k. bosniaj amuziĝas per "ciklo-veturilo".

parolis esperanton ; feliĉe Tarik, akceptita en la sama familio ĉe Yves, iom komprenas, kaj tra li la komunikado pasas. En alia familio oni komunikas per gestoj, kaj ankaŭ per anglaj vortoj, ĉar la gepatroj ja ne lernis esperanton. En la gastfamilio de Denisa kaj Anida, oni devas uzi esperanton, ĉar Mathilde kaj Amandine ne scipovas la anglan.

Dum la 12-taga restado en la familioj, la bosniaj junuloj rekuniĝis plurfoje, por komunaj ekskursoj, al la mezlernejo kie ilin akceptis la direktoro, al la historia urbocentro de Tuluzo, al la Spaco-muzeo, al naĝejo kaj al mezepoka civito Karkasono (Carcassonne).

Venis la momento iri al la pirenea restadejo La Maraude : la 100 kilometrojn de Tuluzo al St-Girons ĉiuj Bosnianoj veturis trajne, akompanataj de Miquela, la matematika instruistino, kiu iniciatis la projekton.

Varman akcepton nin atendis en La Maraude, kies etoso ĉiam pli kaj pli internacias : krom la konstantaj enloĝantoj, kiuj ĉiuj komprenas esperanton, troviĝis tie pola paro kaj tri junaj argentinanoj! La novaj enloĝantoj, kiel Dany, kiu

okupiĝas pri la azenoj, lernas esperanton. Bosniaj kaj francaj infanoj tuj admiris la belegan pejzaĝon kaj panoramon videblan de la cambroj.

Pro ne sufica disponeblo de Fetah, la bosnia akompananto, la restado reduktiĝis de du semajnoj al nur unu. La programo tamen estis riĉa. Ni tutajn posttagmezojn piedmigris, banis la piedojn en purakvaj lagoj kaj en torrentoj, pasigis du noktojn en montara rifuĝejo, kie ni kuiris nian manĝon sur ligno-fajro, kantis ĉirkaŭ la fajro en diversaj lingvoj... Ĉiumatene kelkaj infanoj povis laŭvice iniciiĝi je kaprina prizorgado kaj fromaĝ-farado. Ĉiuj lernis kiel baki panon kaj okazis eĉ esperanto-lecionoj ! Vespere oni ludis, kantis, foje rakontis legendojn, kaj la lastan vesperon oni dancis. Mi preskaŭ forgesis la futbalmaĉojn inter la esperantistoj kaj la aliaj infanoj de La Maraude, kaj la varman akcepton de la Vilaĝestro, kiu invitis la bosnianojn spekti ĉe sia hejma televido la gravan finan mondmaĉon !

Ekestis interesa grupdinamiko : la unuajn tagojn la bosniaj infanoj plezure retroviĝis,


post tiuj dekdu tagoj pasigitaj en diversaj familioj, ili babilis kaj restis inter si. Sekve ankaŭ la francoj restis inter si. Sed iom post iom la roloj ŝanĝiĝis kaj knabinoj kiuj amikiĝis dum la familia restado pli kaj pli ofte amuziĝis kune. La apartiĝo estis tiam inter knaboj kaj knabinoj. Tio evidentiĝis kiam la lastan tagon, ĉiuj knabinoj preferis resti kunaj.

Hodiaŭ la Bosnianoj foriris, per la sama buseto, kaj atingis bonorde Sarajevo, post tridekhora veturado.

Kio okazos nun ? Ĉu la korespondado daŭros ? La infanoj invitis la familiojn ĉe si en Sarajevo: ĉu okazos la reciproka vojaĝo ? Kial ne, sciante ke ĉi-aŭguste estos akceptata en Sarajevo kataluna esperanto-grupo ? Ĉiukaze Miquela plugvidos esperanto-klubon en la lernejo Jean Jaurès, kun ĉiuj geknaboj kiuj deziras plulerni kaj perfektigi, kaj korespondi kun pluraj aliaj landoj.

Ni sekvu iliajn postajn aventurojn !

Jeanne-Marie CASH



La Maraude, 09800 ARRUDT. Oni festas la naskiĝtagon de Mathilde.

Persone Intervjue

Dum ilia memorinda akustika koncerto en la 83a UK en Montpellier, la 6an de aŭgusto 1998, la famaj svedaj rokbandanoj de PERSONE fiere parolis pri entuziasmaj ĵurnalistoj, kiuj intervjuis ilin. Nun plenlumiĝas tiu ĉi misterego: la ĵurnalistoj fakte nomiĝas Ludivine kaj Damien, famaj PERSONE-ŝatantoj, kiuj sukcesis kapti la bandanojn (MARTIN, ĉefkantisto kaj gitaristo, ANDERS, basgitaristo kaj BERTILO, drumisto) en ilian loĝion la antaŭan tagon por iomete babiladi kun ili.

Damica : Saluton ! Ni ĝojas intervjui vin. Ĉu vi povas iomete paroli pri la komencoj de via bando ?

Bertilo : Ha ! La komencoj ! Antaŭ 12 jaroj. Ĉi tiu ligiĝas al la Kultura Esperanto Festivalo (KEF), kiu okazos ankaŭ post unu semajno por la sesa fojo. Ni kunaranĝis la unuan festivalon kaj tiam, Börje Lund, kiu ne plu estas en la bando, havis la ideon, ke ni povus fondi orkestron, nur por ludi iomete dum tiu festivalo, ĉar li rimarkis, ke inter la membroj de la klubo estis muzikistoj. Kaj tiel komenciĝis la afero.

D : Sed poste la konsisto de la bando ŝanĝiĝis, ĉu ne ?

Martin : Jes, fakte tri muzikistoj ne plu estas en la bando.

D : Do por la dua albumo "En la spegulo" (1990), vi ŝanĝis iomete la stilon, kiu iĝis pli propra, ĉu ne ?

Martin : Jes, sed verŝajne plejparte estis ĉar ni ŝanĝis la konsiston de la grupo.

Anders : Estis mia unua kasedo.

Martin : Jes, kaj ankaŭ ĉar Börje forlasis la bandon, estis malpli da komponistoj. Kaj pro tio ankaŭ la sono verŝajne fariĝis iomete pli unueca.

Anders : Kaj Börje ankaŭ interŝanĝis la instrumentojn, kvankam mi nur ludas basgitaron.

Bertilo : Jes, estis do unu basisto kaj gitaristo kaj unu basisto kaj gitaristo ! Kiam Martin kantis siajn kantojn li ludis gitaron ; kiam Börje kantis siajn kantojn li ludis gitaron. Kaj la stilo de Börje estis sufiĉe alia ol la stilo de Martin. Nun nur Martin verkas do pro tio estas pli unueca, pli alia stilo.

Ludivine : Kaj en la tria albumo, "Povus esti simple" (1996), estis

pli roka muziko.

Martin : La kompaktdisko ? Jes, espereble !

Bertilo : Pasis sufiĉe da jaroj, tio estas kvin jarojn por la dua kaj la tria ...

D : La sono estis pli koncerteca, ĉu ne ?

Bertilo : Tio estis konscia afero. Ni decidis ludi kvazaŭ koncerte en la studio, por ŝanĝi kiel eble plej malmulte ...

D : Jes, vi ne faris kiel kutime: vi ludis kune, ne unuope.

Martin : Ni regitris samtempe la drumon, basgitaron kaj gitaron, kaj poste nur aldonis la kantadon kaj kelkajn akustikaĵojn.

L : Ankaŭ la tekstoj evoluis. En la dua albumo, vi multe parolas pri knabinoj sed malpli en la tria.

Martin : Ni ne plu interesiĝas pri knabinoj ! [Ridoj]

D : Jes, male al la unua kie aperis engaĝitaj kantoj kiel "Tute sekura" au "Ĉu al paca cel' ?"

Ĉiuj : Jes, jes.

D : Kaj en la dua, ĉu ne estas tiaj kantoj ?

Bertilo : Eble ne, sed tiu detalo ne estas konscia elekto ; tio estas simple, kio venas.

L : La tekstoj de la tria albumo estis pli seriozaj, laŭ mi.

Martin : Eble.

Bertilo : Pli seriozaj ol la unua. Amo ankaŭ estas serioza afero, ĉu ne ?

D : Jes, jes !

L : Kaj vi kantas pri diversaj temoj ; ekzemple en la kanto "Ili venos", kiuj estas "ili" ? Ĉu ... [Ridegoj] Ĉu eksterteranoj aŭ... ?

Bertilo : Jes, la baza interpreto estas eksterteranoj sed oni interpretas tion ankaŭ kiel la *esperantistoj*, ĉu ne ?

L : Ĉu ?

D : Strange. Mi kredis, ke temis pri anĝeloj.

Bertilo : Eksterteranoj-anĝeloj ; vidataj kiel anĝeloj, kvazaŭ anĝeloj.

Martin : Ŝajnas, ke nia nuntempa plej ŝatata temo estas iomete ironiaj tekstoj pri ... kiel diri ... pri "superkredo" !

Bertilo : Jes, pri religio ... ironic !

D : En tiu "Ili venos", vi diras, ke "[vin] tudas la ekzisto". Ĉu vere ?

Martin : Ne ! Ne temas pri ni fakte.

Bertilo : Temas pri homo, al kiu tudas la ekzisto ! Kaj do li serĉas ian esperon, ion alian kiu

verŝajne povus ŝangi tion.

L : Ĉu vi ludas nur dum E-o renkontiĝoj ?

Martin : Jes. Estas kelkaj esceptoj.

Bertilo : Ŝajnas, ke estos escepto dimanĉon. Ni ludos en Antverpeno kaj estos tute ne esperanta aranĝo.

D : Martin, je la komenco vi lernis Esperanton nur por ludi kun iu rokbando, ĉu ne ?

Martin : Je la komenco fakte estis nur por ludi kun Amplifiki. Dum iom da tempo ni ludis kun Amplifiki.

D : Sed espereble vi trovas nun aliajn avantaĝojn paroli la internacian lingvon !

Martin : Jes, jes, kompreneble ! Ekzemple vojaĝi kaj renkonti aliajn homojn de la tuta Tero, kiel ĉiuj !

L : Ĉu vi ankaŭ ludas sole ? Sur la dua kompilaĵo de Eurokka (Vinilkosmo) aperas kanzono.

Martin : Jes, estis escepta afero. Sed eble venos ankaŭ albumo propra, jes.

L : Ĉu vi nur estas muzikistoj ? Ĉu estas via profesio ?

Martin : Ne, ne.

Anders : Estas mia profesio.

L : Kion vi faras, kiam vi ne ludas ?

Martin : Mi estas arkitekto.

Bertilo : Mi faras nenion ! [Ridoj]

Martin (pri B.) : Komputas kaj faras gramatikon !

Anders : Mi laboras kun muziko. En diversaj lokoj, en diversaj grupoj.

D : Ĉu esperantistaj ?

Anders : Ne. En lokaj grupoj en Stokholmo.

D : Ĉu tio vere permesas al vi gajni monon por vivteni vi ?

Anders (ridante) : Ne multege !

kelkaj jaroj estis ni kaj Amplifiki, nun ŝajnas esti ni kaj ...

Bertilo : La Liberacanoj.

Martin : La liberacanoj, jes, kaj...

Bertilo : Do, se temas pri rokmuziko.

D : Kion vi opinias pri konatiĝi en Malesperantio ?

Martin : Ha ! mi ne kontraŭas, sed mi pensas, ke tio tute ne eblas.

Bertilo : Estas grandega konkurenco. Por esti rekonata oni devas esti tre bona kaj havi multe da bonŝanco.

Martin : Kaj ankaŭ ĉar ni kantas en Esperanto, estas rigardata kiel iomete stranga afero de multaj homoj.

D : Sed ĉu vi ne opinias, ke Esperanto iun tagon fariĝos pli disvastigita, pli parolata ?

Martin : Jes, povus okazi.

Bertilo : Kiu povas scii ? Estus bone !

Martin : Tiam ni jam estos maljunaj kaj do... ne plu estos rokbandoj !

[Ridoj]

D : Sed tio povas okazi post malmulte da tempo. Ĉu vi ne opinias, ke ni vivas en ŝanganta epoko ?

Bertilo : Fakte, jes. Povus tre rapide okazi, tute ne antaŭvidate. Estas iuj faktoroj, kiujn ni tute ne konas. Kaj tiam ni gajnus multege da mono !

[Ridegoj]

L : Ĉu vi ne gajnas...

Bertilo : Ne. Oni pagas al ni vojaĝkostojn, restadkostojn, tio estas jam ege bona !

L : Estas agrable. Vi vojaĝas kaj ...

Bertilo : Jes, sed malofte. Vidu, antaŭ tiu ĉi renkontiĝo ni ne ludis entute dum du jaroj.

L : Ĉu vere ?

Bertilo : Jes, tute ne. La lastan fojon estis en KEF en Kopenhago. Kaj antaŭ tio ankaŭ en la IJK en Güntersberge.

L : Kion vi faris dum tiuj du jaroj ? [Ridegoj]

Bertilo : Ni forgesis la muzikon!!!

Martin : Tamen ni iomete ludis akustike en tre malgrandaj aranĝoj.

Bertilo : Unu fojon.

Martin : Ha, nur unu fojon ?

Bertilo : Jes. Estis malgrandaj okazoj en Stokholmo.

D : En antaŭa intervjuo vi parolis pri "stariĝi reton por organizi turneon tra esperantokluboj"...

Martin : Ĉu ?

Bertilo : Jes, kiam ni parolis kun

Persone



Povus esti simple

L : Kion vi opinias pri la muziko en Esperantio ? Verŝajne vi estas unu el la plej ŝatataj grupoj ...

Martin : Ŝajne estas unu el la plej malmultaj, ĉu ne ? Do la elekto ne estas tre granda ! Dum

Flo estis io tia sed...

D : Ĉu tio estas ...

Martin : Tute forgesita !

Bertilo : Ni ĉiam pensas, ke organizantoj pensas pri tio, ke ili povus venigi nin en kunvenon, do nin kaj aliajn esperantistajn muzikistojn. Aŭ organizi turneon inter kluboj en Eŭropo ; kaj pro tio gravas havi buĝeton. Sed preskaŭ neniam okazas. Nur en Pollando...

D : Morgaŭ vespere vi koncertos en la kongreseja granda salono. Kion diri pri tiu grandega evento ?

Martin : Ho, demandu poste !
[Ridoj]

L : Ĉu vi ne iomete timas, ĉar via publiko estos sufiĉe maljuna ?

Ĉiuj : Jes, ni timas !

Martin : Sed tamen estos okazo por ludi nian akustikan repertuaron. Tamen estas sufiĉe trankvila kaj tenera plejparte.

Bertilo : Kelkajn kantojn ili ne tre ŝatos. Estas certe.

Anders : Rokecajn kantaĵojn ni ludos akustike.

Bertilo : Iuj estos ankoraŭ iomete rokecaj kaj ili ne komprenos, pri kio temas.

D : Ĉu estos novaj kanzonoj ?

Martin : Jes, kiom da ?

Bertilo : Sep.

Martin : Sep tute novaj, kiujn ni neniam antaŭe ludis.

D : Ĉu akustikstilaj ?

Martin : Kelkaj.

Bertilo : Estas unu tute nova neniama prezentita akustike, kiu nomiĝas "Patro Nia". Ne temas pri Zamenhof. [Ridoj]

D : Ĉu pri Dio ?

Bertilo : Jes.

D : Ĉu vi kredas je Dio ?

Ĉiuj : Ne, ne. [Ridoj]

D : Kion vi opinias pri Dio kaj pri la "vivmistero", kiun vi "serĉas" en "Neĝo dancas" en via dua albumo ?

Martin : Do, kiel diri ? Plej facile oni povas diri, ke oni ne povas scii ion pri tio.

Bertilo : Mi estas ateisto, eĉ kontraŭ... kontraŭdiisto. Se Dio ekzistus, mi tamen rifuzus kredi je Ĝi ! [Ridoj]

D : Ĉu aliaj kantaĵoj temas ankaŭ pri tiuj strangaj temoj ?

Martin : Estas ankoraŭ unu kun pli malpli la sama temo : "Se la cerbo volas".

Bertilo : Mi neniam komprenis ĝin !

L : Ĉu tiuj kanzonoj aperos surdiske ?

Martin : Jes, jes. eble vi konas tiun "projekton 2000", kiun Flo aranĝas por eldoni E"-diskojn.

Bertilo : Jam aperis du diskaj.

Martin : Estas planite dek diskaj.

D : Pri kio temas ?

Martin : Eurokka faris tiun projekton, en kiu ĉiu grupo, ĉiu artisto faros propran kompaktdiseton kun ses ĝis ok kanzonoj.

D : Ĉu vi jam planis titolon por la via ?

Martin : Ne... ĉu vi planis ?

Bertilo : Fakte ne. [Ridoj]

D : Kiam ĝi laŭplane aperos ?

Martin : Espereble ĝi aperos plej malfrue aŭtuno, verŝajne.

D : Vi venas de granda metropolo, Stokholmo, "bonurbo" laŭ via kantaĵo aperinta en via unua albumo "62 minutoj". Kion vi opinias pri mia bonurbeto Montpellier ?

Martin : Ha, ĝi estas fabela !

Bertilo : Mi plene enamiĝis !

Martin : Jes, estas mirinda, estas kiel sonĝo ! Almenaŭ dum nokto : la stratetoj kaj placoj ĉiam plenaj je homoj kaj... estas mirinda.

D : Do komponu kantaĵojn pri ĝi

Martin : Jes, eble. Estas bona ideo.

D : Kutime la vetero estas ĉiam bela tie ĉi. Sed hieraŭ pluvis kaj do pri la ekstera sursplanada koncerto, en kiu estis planite, ke vi kunludis, sed kiu pro la pluvo ne okazis, kion por diri ?

Martin : Ni nur povas plori, nenion diri.

Bertilo : Estis katastrofo, ĉu ne ? Sed fakte ni turneas kaj estas kvin koncertoj en tiu tuta turneo. Do ne estas la fino de la mondo !

D : Jes, ĉar post Montpellier vi reiros norden, ĉu ne ?

Martin : Jcs. Unue al Antverpeno kaj poste al tiu KEF en Svedio, en la arbaro.

Bertilo : Tiu KEF estas ligita al Persono : ni ludis en ĉiuj KEFoj. Estas tre grava por ni. Kaj oni diras, ke eble estus rekorda KEF ĉi-foje. Aliĝis jam 200 homoj aŭ pli. Ni tre antaŭiĝojas.

D : Ĉu vi opinias, ke via rokbande longe vivos ?

Martin : Espereble !

Bertilo : Ĝis nun ĝi vivis nur jaron post jaro, sen planoj por la estonteco. Unue ni intencis, ke ĝi estus nur por la unua KEF kaj ne plu. Sed simple daŭris. Mi opinias, ke estas kiel la Rolling Stones, ke ni 60 jarojn ankoraŭ ludos.

D : Espereble !

Bertilo : Sed kiam ĉiuj en la

publiko estos 60-jaraj, estos nova generacio, kiu nur rikanos pri la stulta muziko de la olduloj.

L : Ĉu vi loĝas en Stokholmo ?

Ĉiuj : Jes.

L : Ĉu vi renkontas unu la alian ?

Ĉiuj : Jes, ofte.

L : Ĉu vi konis unu la alian antaŭ ol fondi tiun bandon ?

Bertilo : Jes, Martin kaj mi.

Martin : Jes, ni konas unu la alian delonge. Ni interkonatiĝis en muzika lernejo, kie ni studis dum unu jaro.

D : Kaj, Martin, vi ankaŭ studis filozofion, ĉu ne ?

Martin : Jes, iomete. Nur dum unu semestro.

D : Kaj kial ne plu ?

Martin : Ĉar ne eblas vivteni sin per filozofio ! Sed estis tre interesa. Kiam mi havas la okazon mi legas filozofion. Sed arkitekto estas iomete pli konkreta profesio ; oni povas vivteni sin. Kaj mi ankaŭ tre interesiĝas pri arkitekturo.

D : Ĉu vi volas diri ion specialan plian al la legantoj de *Jefo Informas* ?

Bertilo : Aĉetu nian venontan diskon ! [Ridoj]

Martin : Kaj invitu nin al festivaloj, kiam ne pluvas ! [Ridoj]

Bertilo : Ni tre ĝojas, ke ni trovas ĉi tie homojn, kiuj vere interesiĝas pri nia muziko. Estas tre bona sento !

(La intervjuon transskribis Damien)





Korespondpetoj



Kuznecova Elena
Veremeevka, 151
211540 Gorodok,
Vitebskaja obl., Belorusio

shlst@todes.org.by (Michael Shelestov)
(Bonvolu meti "por Elena" en la temlinio)

Mi estas 18-jara junulino, studanto en universitato en Vitebsk.
Mi deziras korespondi kun gestudentoj en la tuta mondo pri geografio kaj historio. Ankaŭ mi volas interŝanĝi ideojn, bildkartojn kaj fotojn.

Mirek IWANOWSKI
ul.Brzozowa 52/13
41-506 Chorzow
Polando

leon@polsl.gliwice.pl
http://zeus.polsl.gliwice.pl/~leon

Urbo: Chorzow proksime Katowice, en Supra Silezio.
Mi estas viro 22 jara, komencanto, komputila scienco kaj administrado kaj komercado studento.
Interesoj: komputiloj, 3D grafiko, batalaj artoj, armilo, moderna tekniko, ĉio ridinda.

CHOI Myoung-ho
CPO BOX 3047
Seulo, Koreio
cyan@nownuri.net

Mi estas 24 jara virino, komencanto.
Interesoj: Esperanto, kanti, ludi pianon, kuirilo, legi
Mi volas korespondi kun Italio, Francio, Aŭstrio kaj Kanado.

LEE Jung-hwa
CPO BOX 3047
Seulo, Koreio
speciala@unitel.co.kr

Mi estas 29 jara fraŭlino, mi flue parolas Esperanton.

Interesoj: Pupteatro, Radioamatoro
Mi volas korespondi kun eŭropaj samideanoj.

Michele BONDESAN
via Baroni, 26
45100 ROVIGO - ITALIA
mbondes@tin.it

Mi estas viro 15 jara, komencanto.
Interesoj: preskaŭ ĉio ajn kolektanto, legado, birdoj.
Urbo: Rovigo, proksime de Padua, Venice, Bologna
Mi preferas ret-poŝton.



Bill MAK
4/B Wah Kin Mansion
18-20 Fort Street
North Point
Hong Kong, Ĉinio

bill_mak@cathaypacific.com
au: machaut@hotmail.com

Mi estas 24 jara viro. Mi ŝatas kontakti Esperantajn aktivulojn, precipe junuloj en Aziaj landoj.
Interesoj: lingvoj, skrib-sistemoj, muziko, Esperanta movado, kaligrafio, pied-migrado.

Tania Roig Perez
46 No 3506 apto 5
e/35y 37 Playa
Havano
Kubo, CP11300

Mi estas 28 jara Kubana virino.
Mi estas ĉefspecialistino pri sociala helpo.
Mi ŝatus trovi korespondantojn el la tuta mondo pri kiu ajn temo.
Mi deziras paper-poŝte korespondi.

Marco TREVISÁN
Madrido, Hispanio
oxartum@mailcity.com

Mi estas ital-hispana 20-jara fraŭlo.
Mi esperantiĝis en 1996, sed mi ankoraŭ ne parolas tre bone.
Mi tre ŝatas sciencojn (mi studas fizikon en la Aŭtonoma Universitato), librojn (legi kaj skribi), lingvojn, historion, naturon...
Mi estas tre scivolema. Mi tre ŝatas korespondadon, kaj mi volus korespondi kun gejunuloj de tutmondo.

Jeremy AVERY
10380 - 167 Street
Surrey, BC, CANADA
V4N 1Z2
theobscure@hotmail.com

Mi estas fraŭlo 23 jara, komencanto.
Interesoj: Futbalo, legi librojn, kaj skribi. Mi estas Kristano.
Mi logas en Vancouver, Brita Kolombio (BC), Kanado

Anthony MOON
New York, NY
Usono
anthony.moon@gs.com

Mi estas viro 28 jara, esperanta komencanto.
Interesoj: pentrado, arkitekturo, literaturo.

Ana Maria, Antonio, Luiza, Ronaldo kaj Selma
barreiros@scainet.com.br
Kara Samideano,
Ni estas membroj de loka klubo de E^o "Klubo Speco", ŝtato de São Paulo en Brazilio. Ni estas komencantoj en la esperanta lingvo. Ni elektis vin kiel nia unua korespondulo, ni esperas vin stimuli. Nia grupo konsistas el tri virinoj kaj du viroj (junaj), Ni esperas, ke vi baldaŭ respondos. Grandan ĉirkaŭprenon !




Kalendaro



DECEMBRO

27 - 03 decembre-janvier
 —> Germanio (Kassel)
 ◆ 42a Internacia Seminario (IS) pri la temo "Dependeco - Faktoj, Sekvoj, Solvoj" (Vidu JI 3/98)



27 - 03 decembre-janvier
 —> Saarbrücken (Germanio)
 ◆ 15a Internacia Festivalo, ĉefe por junaj familioj kaj personoj 25-55 jaragaj (temo : hobioj)
 Inf : Hans-Dieter platz, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein
 Tél : +49-5624-8007
 Fax : +49-5624-322

27 - 06 decembre-janvier
 —> Chili
 ◆ Jamboree mondial, avec la participation de SEL, l'association des scouts espérantophones.
 Inf : Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Séptima Región, Chili
 Tél : +56/75/310/-382
 strigo@entelchile.net

28 - 02 decembre-janvier
 —> Suisse (Centre La Kvinpetalo)
 ◆ "Sekretoj de ŝakludo" kaj "Lerni pri lignoarto"
 Inf : Centre Culturel Espéranto, Postiers 27, CP 311, La Chaux-de-Fonds
 Tél/fax : (41)32-9267407

JANUARO

22 - 24 janvier
 —> France (près de Paris)
 ◆ 9e week-end gastronomique organisé par JEFO sur le thème des «douceurs» (pour célébrer la fin du Ramadan, la cuisine orientale sera à l'honneur avec miel, amandes et épices colorées, couscous, etc)
 Inf : Pascal Lécaille

27 - 03 janvier-février
 —> Colombie (Bogotá)
 ◆ 4a Tut-Amerika kongreso de E° kun la temo "Esperanto kaj la tria jarmilo"
 Inf : Esperanto - LKK , Apdo 54800, Bogotá-2, Colombie
 erflorez@openway.com.co

FEBRUARO

14 - 20 février
 —> Pologne (Wroclaw)
 ◆ 40a internacia skisemajno, organizata de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Asocio)
 Inf : Janina Wereszka, ul. Klodnicka 43/27, PL-54-217 Wroclaw, Pologne



27 - 28 février
 —> France (Nantes)
 ◆ Staĝo organizata de la grupo Esperanto-44 (divers-nivelaj kursoj kaj distra vespero)
 Inf : Hélène Vincent, 3 rue

Blaise Cendras, FR-44100
 Nantes
 tél : 02 40 43 92 42

MARTO

05 - 09 mars
 —> Ukraine (Kiev)
 ◆ 11a EoLA, Internacia Festivalo de Esperanto-Arto
 Inf : Grigorij Arosjev, ab. ja. 31 RU-117071 Moskva
 arosjev@esperanto.nu



APRILIO

02 - 05 avril
 —> France (Glax, près de Montbéliard)
 ◆ 10e week-end gastronomique organisé par JEFO sur le thème du fromage (le 2e sur ce thème).
 Inf : Pascal Lécaille.

03 - 05 avril
 —> France (Glax, près de Montbéliard)
 ◆ 54e congrès de SAT-Amikaro (Association des travailleurs espérantophones des pays de langue française).
 Inf : Roland Cuenot, 35 rue de Villers, 25700 Valentigney
 Tél : 03 81 34 64 46
 ou SAT-Amikaro, 67 av Gambetta, 75020 Paris (fax : 01 47 97 71 90)
 http://www.worldnet.net/~sat-esp/



Viaj kontaktoj ĉe JEFO / Vos contacts chez Espéranto-Jeunes


Same kiel por ĉiuj asocioj, la komitato de JEFO elektas estraron. La lokajn kontaktojn tenas niaj regionaj kunordigantoj (vidu ĉi-suban mapon). Aliaj aktivuloj havas rolon komisiitan de la komitato. Tiu ĉi paĝo prezentas la aktivulojn elektitajn dum la ĝenerala asembleo de 1998-04-18/19.

Comme pour toutes les associations, le conseil d'administration de JEFO choisit un bureau. Les contacts locaux sont assurés par nos coordinateurs régionaux (voir la carte ci-dessous). D'autres actifs ont un rôle délégué par le conseil d'administration. Cette page présente les actifs élus par l'assemblée générale de 1998-04-18/19.

Sidejo / Siège social		
Esperanto-Jeunes	4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris	jefo@esperanto.org http://ttt.esperanto.org/jefo
Estraro / Bureau		
Bruno Flochon (prezidanto/président)	6C av de l'hippodrome 69890 La Tour de Salvagny	BFlochon@esperanto.org t+f[r]: 04 78 48 00 40 m: 06 60 58 00 40
Olivier Moreau (kasisto/trésorier)	48 rue Raffet 75016 Paris	OMoreau@esperanto.org t[r]: 01 42 88 51 58
Pascal Lécaille (helpkasisto/trésorier adjoint) (CR Rhône-Alpes)	BP 3019 69394 Lyon cedex 03	PLecaill@esperanto.org t+f[r]: 04 72 36 07 14
Cédric Forgeau (sekretario/secrétaire)	8 rue des Hérídaeux 69008 Lyon	CForgeau@esperanto.org t: 04 78 01 15 97 f: 04 78 00 20 35
Komitato / Conseil d'administration		
Flavie Audibert	1 rue Henri Say 92600 Asnières	t: 01 47 93 15 04
Yves Bachimont (CR Normandie)	106 rue d'Orléans 14000 Caen	YBachimont@esperanto.org t: 02 31 75 15 74
Philippe Bérizzi	17 allée JB Clément 78570 Andrésy	PBerizzi@esperanto.org t[r]: 01 39 70 78 15
Vincent Charlot (partis politikaj)	10 square Savorgnan de Braza 94310 Orly	VCharlot@esperanto.org t: 01 48 92 63 79
Ludivine Delnatte (rédactrice JI)	12 rue Pierre Curie 42000 St-Etienne	t: 04 77 41 14 86
Alain Fagot (rencontres gastronomiques)	Egelantiersstraat 12b NL-1015 PL Amsterdam	AFagot@esperanto.org t: +31 20 62 65 509 f: +31 20 592 41 99
Catherine Giangrossi (enfants et Krokodileto)	1 rue Trarieux 69003 Lyon	CGiangrossi@esperanto.org t+f[r]: 04 72 36 07 14
Dávid Hromada	14 rue Louis Bouchet 93220 Gagny	DHromada@esperanto.org t: 01 43 32 86 78
Émilie Joly (adolescents)	Chemin des arènes 13430 Eyguières	EJoly@esperanto.org t+f: 04 90 59 84 90
Didier Loison (CR Bourgogne/Franche-Comté)	45 rue Verrerie 21000 Dijon	DLoison@esperanto.org t[r]: 03 80 50 11 28 tattoo (30s): 0 656 273 272
Sylvie Roques (SEREG)	8 rue Jean Soula 31240 Saint Jean	SRoques@esperanto.org t: 05 61 35 84 44 m: 06 81 58 71 03

Karine Texier (CR Bretagne)	4 cours Kennedy 35000 Rennes	KTexier@esperanto.org t+f: 02 99 59 69 08
Magali Texier (subventions) (relations franco-allemandes)	5, impasse Alphonse Royer 56700 Hennebont	MTexier@esperanto.org t: 02 97 36 39 40 f: 02 97 81 02 09
Laurent Vignaud (CR Pays de la Loire)	3 allée du Haras Appt 132 49100 Angers	LVignaud@esperanto.org t: 02 41 20 19 40 m: 06 12 11 17 82 Minitel: 3614 CNX*JEFO49
Aliaj kunordigantoj / Autres coordinateurs		
Marc Bavant (cours par Internet et site)		MBavant@esperanto.org
Coralie Delnatte (CR Languedoc-Roussillon)	8, impasse dela Gayonne 34500 Béziers	t+f: 04 67 11 20 59
Bruno Ferré (CR Aquitaine)	45 rue Borie 33300 Bordeaux	BFerre@esperanto.org t: 05 57 87 04 58
Erwin Kretz (CR Alsace/Lorraine)	22 rue Berthe Molly 68000 Colmar	t: 03 89 24 98 84
Vincent Pacheu-Bourrely (CR PACA)	Vallon Tour Keyrie 13100 St Marc Jaumegarde	mapacheu@minitel.net t: 04 42 24 95 83

Mallongigoj / Abréviations				
t = Téléphone	f = Fax	[r] = Répondeur	m = Mobile	CR = Coordinateur Régional



espéranto

Le saviez-vous



Il existe une langue connue par des millions de personnes, parlée sur les cinq continents et accessible à tous

Une langue pour partir au bout du monde...

Langue neutre, elle n'appartient à aucune nation mais à tous les peuples. Celui qui la parle peut rencontrer beaucoup de monde en voyageant, lors de festivals, de rencontres ou même par correspondance...

L'espéranto, tout le monde peut l'apprendre

- des règles de grammaire sans exception,
 - aucun verbe irrégulier,
 - des racines que l'on retrouve dans de nombreuses langues,
 - des familles de mots faciles à construire et à retenir
 - un vocabulaire riche, précis et nuancé,
 - des règles de prononciation très simples,
 - donc une langue beaucoup plus rapide à apprendre que toutes les autres !
- Et si vous voulez apprendre d'autres langues, l'espéranto vous y aidera...

Une association de jeunes pour l'espéranto

Espéranto-Jeunes (JEFO) réunit des espérantophones de toute la France pour faire connaître l'espéranto, en particulier auprès des jeunes, informer sur la culture espérantophone (livres, musique, spectacles...), les moyens d'apprendre la langue et les prochains événements en France et dans le monde.

L'association organise aussi des rencontres, festivals et week-ends gastronomiques tout au long de l'année. Profitez-en pour découvrir la langue internationale espéranto et prendre un bain linguistique !

L'espéranto, une vraie culture vivante

L'espéranto vit pleinement pendant les festivals, rencontres et congrès organisés tout au long de l'année dans de nombreux pays. Des troupes de théâtre, des chanteurs, des groupes de musique s'y produisent. C'est aussi l'occasion de découvrir les derniers livres, revues et disques compacts en espéranto. Se réunir, danser, discuter, rire, échanger des idées... dans une ambiance vraiment internationale.



PASPORTA SERVO

Un autre tourisme : direct et convivial

Le réseau d'hébergement gratuit «Pasporta Servo» permet, pendant les voyages, de connaître le pays visité et ses habitants.

En effet, plus de 1500 espérantophones de 70 pays sont volontaires pour accueillir des jeunes du monde entier.

Vous pouvez ainsi passer la nuit dans une famille et découvrir ce qui aura échappé aux autres touristes, tout simplement en parlant en espéranto avec vos hôtes.

Espéranto-Jeunes - 4 bis, rue de la Cerisaie - 75004 PARIS

Internet : <http://ttt.esperanto.org/jefo> • jefo@esperanto.org